


SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

1994/5-6

DE ETURBO AL ETURBO

HÖÖR EN 1994



HJO EN 1995

La Espero

Organ för
Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Decembro 1994 • 82-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktör/redaktoro:
Per Aarne Fritzon,
Västertorpsvägen 154,
129 44 Hägersten,
tel. 08-97 47 76

Frågor om prenumeration o. dyl.:
Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorn

Utformning: Omnibus, Tyresö

Tryck: Rönquist & Co, Sollentuna 1994

Prenumeration 1994: 150 kr. Gåvo-
prenumeration till utlandet: 80 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår
i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3,
Esperantoförbundet.

Esperantoförbundet

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00, fax: 08-34 08 10

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla
öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1994:
Direktansluten medlem 150 kr.
Famijmedlem (utan tidning) 60 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 60 kr.
Medlemmar under 30 år är samtidigt
medlemmar i Sveriges Esperantisters
Ungdomsförbund och får dess tidning
Kvinpinto.

Esperantoförlaget

Adress: Möllevångsgatan 20 B,
214 20 Malmö

Telefon: 040-12 20 29

Postgiro: 578-5

Telefontid: 1 september-15 maj: torsdagar
kl. 17-18. Skriftliga beställningar
expedieras under hela året.

Expedition: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson,
Storgatan 13, 753 31 Uppsala

La Espero estas presata  sur recikligita papero.

KLUBO MIL 1994

Norrköpings Esperantoklubb	1000
H. Sundström, Älvsjö	10 000
Kerstin Kristoferson, Stockholm	1000
Sten Broman, Skövde	1000
Gösta Hedlund, Uppsala	1000
Motala Esperantoklubb	1000
Malte E. Smith, Kävlinge	1000
Karl Rönberg, Västerfärnebo	1000
Helsingborgs Esperantoförening	5000

KLUBO CENT

K.H. Persson, Motala	200
Olle Olsson, Lund	100

DONACOJ

William Malmsten, Göteborg 50; Väinö
Ölund, Eskilstuna 80; Ulla Luin, Tyresö
375; "Märtha och Majken", Göteborg
(födelsedagsuppvaktning för Ingemar
Nordin och Oskar Svantesson) 200;
Malmö Esperantoförening 240.

*SEF kore dankas ĉiujn donacintojn kaj
donaĉintojn. Pliaj donacoj bonvenaj al
poŝtgira konto 20 12-3, SEF.*

Ankaŭ ekonomie brila kongreso

La SEF-kongreso en Höör estis bri-
la aranĝo ankaŭ el ekonomia vid-
punkto.

La LKK-prezidanto Bertil An-
dreasson kaj la kasisto Gertrud
Lund povis subskribi ekonomian
finraporton, kiu montras belan
profiton. Al tiu rezulto helpis ankaŭ
malavara donaco je 5000 kronoj de
Helsingborgs Esperantoförening.

Laŭ la reguloj la aranĝanto, ĉi-
kaze la Suda distrikto de SEF, rice-
vas kvaronon de la profito por pro-
pra uzo.

Gör en insats!

Esperantoförlaget behöver öka sitt andelskapital för att ge ut nya läro-,
ord- och läseböcker, romaner, bokkassetter mm. Du kan hjälpa till –
antingen genom en egen insats eller genom att få din förening
engagerad! Det finns andelsbevis till

värdet av 500, 1000

och 10 000


kronor. Din
förening, och

du själv, får
teckna hur

många bevis
som helst.

Adress och
postgironummer

hittar du här till
vänster.



Bunta kaj internacia la sveda kongreso en Höör

Oni ĉiam alvenas al SEF-kongreso plena de scivolemo. Kiel aspektas, kia etoso, kiom da partoprenantoj, kiom da konatuloj?

En Höör la unua videbla signo pri nia kongreso estis la flago, kiu flirtis super la granda placo. Sed nia kongresa kvartalo situis aliflanke de la fervojo – tie atendis nin la agrabla dioceza centro Åkersberg.

Atendis nin ankaŭ la fervora 6-kapa LKK – Bertil kaj Lisbeth Andreasson, Gertrud kaj Torsten Lund, Sven Strandberg kaj Barbro Haraldsson – disdonante dokumentojn en gaje buntaj tekoj.

Ĝoje oni vidis en la kongresana listo numerojn iom super 100, la aliĝo do estis kontentiga. Ankaŭ sufiĉe internacia – ne nur svedoj, sed ankaŭ nomoj el Germanio, Estonio, Finnlando, Hungario... kaj poste aldoniĝis ankaŭ Pollando.

Tri bongustaj tagoj

Survoje al la ĉambroj, ĉu en la sama domo aŭ en la gasthejmo, oni sentis la

agrablan atmosferon. Kaj certe ĉiuj estis kontentaj pri siaj ĉambroj.

La ricevita dokumentaro aspektis tiel alloga, ke oni en la ĉambro tuj volis ĉion studi, forgesante malpaki siajn valizojn kaj forgesante la malsaton. Sed jen – en unu koverto multkoloraj kuponoj pri manĝeblecoj.

Do reen al la akceptejo kaj poste al la manĝejo por la unuaj spertoj. Bufeda aranĝo, kiel poste dum la tuta kongreso, tagmanĝe kombinita kun servado de varmaj pladoj. Tri tre bongustaj tagoj estis antaŭ ni, montriĝis...

Interkona vespero

Interkonatiĝis, tion plej multaj jam faris, sed laŭ la tradicio kompreneble okazis ankaŭ Interkona vespero.

Inter la bonvenigantoj troviĝis reprezentanto de la dioceza domo. La posta distro estis internacia: Harold Brown rakontis pri stranga aventuro en Usono, kaj eksterlandaj gastoj prezentis sin.

Unu el ili estis Stefan MacGill, por ne paroli pri lia plej juna familiano, ĉarma 2-jara knabino, kiu jam nun donis etan pruvon pri sia esperantisteco. Poste dum la kongresaj tagoj oni ĝoje povis rigardi malgrandan infankongreseton en la ĝardeno: la infanoj de MacGill kaj Svenonius, ludantaj kaj babilantaj en brila Esperanto.

Bunta kaj enhavoriĉa

Do estis bona prelude al la kongreso. Bunta kaj enhavoriĉa estis ankaŭ la daŭrigo. Pri la kunvenoj kaj kelkaj el la aliaj aranĝoj oni raportas en aliaj artikoloj. Ni volas en tiu ĉi ĝenerala trarigardo nur prinoti

- ke la diservo povis okazi en bela, moderna preĝejo ĉe la kongresa korto. Tie predikis nia germana gasto Adolf Burkhardt, kiu ankaŭ en tiu maniero multe kontribuis al la kongreso;
- ke la kongresa vetero estis multe pli agrabla ol en Upsalo pasintjare. La

Ekspozicio pri esperanta radio tutmonde



Agneta Emanuelsson dum praktika demonstrado en la kongreso en Höör

Dum la SEF-kongreso en Höör estis aranĝita ekspozicio pri "Esperanto en radio". Ĝi estis muntita sur ekranegoj tuj ĉe la enirejo de la kongresejo kaj prezentis la tri svedajn staciojn Radio Esperanto en respektive Falköping, Malmö kaj Västerås, kaj la internaciajn Radio Pekino, Radio Vatikana, Pola Radio kaj Estona Radio. Unu ekspoziciero temis pri la stacio 3 ZZZ en Melbourne, Aŭstralio, alia pri la tutmonda reto de radio-amatoroj ILERA. Fine la ero "Radio-publiko, kunlaboro estas necesa" memorigis pri tio, kiom gravaj estas reagoj kaj kuraĝigo flanke de la aŭskultantoj por la laboro de la esperant-lingvaj stacioj.

Apud la ekranegoj troviĝis angulo, kie eblis sidi kaj komforte aŭskulti specimenojn de diversaj Esperanto-elsendoj. Sur tablo kuŝis informoj pri la diversaj radio-stacioj, kun adresoj, horoj de elsendo ktp.

La ekspozicio vekis tre favorajn reagojn kaj estos montrata en aliaj svedaj lokoj kaj verŝajne ankaŭ dum la venontjara UK en Tampeo.

Homoj en kongreso

La konferenc-hotelo en Höör estis tre bona kaj taŭga por nia SEF-kongreso. Jam vendrede vespere komenciĝis la programo, kaj ni povis aŭskulti al amuzaj prezento kaj rakonto de **Harold Brown**.

Roland Lindblom informis pri diversaj aferoj kaj ankaŭ rakontis pri maljuna sinjorino, kiu telefonis al li por kontroli la esperantan tradukon de sveda studenta kanto, ĉar ŝi diris, ke ŝi forgesis la lastan strofon. Por montri, ke ŝi memoras la aliajn strofojn, ŝi ekkantis – tamen ne en Esperanto, sed en Transpiranto! (*Internaciaj legantoj legu en La Espero 6/93 – ndlr.*) Roland admonis ŝin telefoni al **Gunnar Ljusterdal**, la redaktoro de la gazeto, kiu okupiĝas pri transpirantaĵoj.

Kongresa inaŭguro

La inaŭguro sabate komenciĝis per bela folklora muziko prezentita de anoj el la muzika klaso de la loka lernejo. La prezidanto de la komunumo, **Per-Olof Ågren**, ĉeestis kaj rakontis interesoveke pri la regiono. Li estis fiera, ke la komunumo bone subvencias la muzikklason kaj aliajn kulturajn aktivecojn.

De la podio salutis ankaŭ la eksterlan-

daŭrigo de paĝo 3

prezidanto de la komunuma estraro, **Per-Olof Ågren**, ŝercis, ke ni havas bonajn kontaktojn kun la meteologio, pensante pri la ĝisnuna SEF-estrarano **Haldo Vedin**;

- ke la plezura vespero en la sabato prezentis brilajn artistojn – ludistoj kaj kantistoj el Höör kaj Södra Rörum;
- ke la ĉiam lerta aŭkciado de Torsten Lund denove transformis la libroaŭkcion en pintgajan kongresan programeron;
- ke la du prelegoj estis vere altnivelaj: Adolf Burkhardt pri la germana Esperanto-biblioteko kaj Stefan MacGill pri siaj instrumentoj kaj lernolibroj;
- ke pli belan ekskursocelon ol Bosjökloster ne eblas trovi;
- ke multaj kongresanoj bedaŭris, ke **Ebbe Vilborg** ne povis ĉeesti nun, kiam li estis nomita honora membro de SEF pro sia granda vortara laboro.

Börje Andersson

daj gastoj **Stefan MacGill** kaj **Adolf Burkhardt**.

Por iom ligi la nuntempon kun la komenciĝo de la esperanto-movado en Höör, la "dojeno" Olle Olsson rakontis pri la tempo 1923–29. La frato de Olle, **Nils Olsson**, ankaŭ estas grava parto de la Esperanto-historio de Höör kaj ni ĝojas, ke li ankoraŭ povis sidi inter ni.

La jarkunsido

Okazis kelkaj ŝanĝoj en la estraro de SEF. **Ulla Luin**, sekretario de kelkaj jaroj, lasis la estraron "por kelka tempo". **Haldo Vedin**, plurjara estrarano kaj prezidanto de la klubo en Norrköping, retiriĝis esperante, ke nova persono kun novaj ideoj volas eniri post li. Ankaŭ **Leif Nordenstorm** petis liberiĝi de sia posteno kiel estrara anstataŭanto.

Nu, se unu Luino forlasas, alia Luino devas daŭrigi, kaj por ne rompi la kontinuecon, **Franko Luin** denove pretas labori en la estraro. Sed, kvankam estas bone havi spertulojn en la estraro, ni bezonas ankaŭ novajn homojn, ĉar novaj esperantistoj alportas novajn ideojn. Tion dirinte, ni prezentos al vi du tute novajn anojn de la estrara teamo:

Aira Kankkunen el Gotenburgo, kiu nun fariĝis ordinara estrarano, estis konektita al la estraro jam antaŭ jaro kiel anstataŭanto, ĉar ŝi montris intereson kaj energion por movadaj aferoj. Aira studis Esperanton en Karlskoga. Ŝi jam aperigis poemaron kaj estis premiita ĉe la Belartaj Konkursoj dum la UK en Vieno en 1992. Kiel poetino ŝi membras en la verkista societo de Gotenburgo, kaj tie ŝi reklamis pri Esperanto. La novaĵo pri rekono de Esperanto kiel literatura lingvo en la tutmonda verkista asocio PEN estis tre bonvena por Aira, kaj tio certe helpis al ŝi en la reklamado.

Jill Hillford estas nova anstataŭanto post Leif Nordenstorm. Oni facile imagas al si, ke ŝi interesiĝas pri lingvoj, ĉar ŝi instruas la anglan, la francan kaj germanan. Por perfektigi en la lingvo Esperanto, ŝi studas en rondo en Lund, kiun venas origine el Britio. Jam nun ŝi volas helpi pri la aranĝado de turneoj de eksterlandaj esperantistoj en Svedio, kaj tion ŝi fa-

ros kunlabore kun Aira.

Roland Lindblom kun iomete da bedaŭro konstatis, ke la elektoprepara komitato ne trovis voluntulon por transpreni la prezidantan postenon, kaj li do elektiĝis por ankoraŭ unu jaro.

Stefan MacGill

Stefan estas ja unu el la plej konataj esperantistoj en la mondo. Li laboris longe en Roterdamo ĉe UEA. Li estas ofta preleganto kaj kursgvidanto. Li estas antaŭa prezidanto de ILEI kaj nuna redaktoro de la porinfana gazeto *Juna Amiko*. Li verkis plurajn lernilojn kaj volonte reklamas sian libron *Tendaraj Tagoj*; ĝi estas verkita por gejunuloj, sed Stefan rimarkis, ke ankaŭ plenkreskuloj ŝatas ĝin.

Lia tre interesa prelego dum la SEF-kongreso temis pri modernaj metodoj instrui Esperanton. Li ne ŝatas lernolibrojn kun la kutima kato sub la tablo kaj vizito en butikoj. Lastatempaj provoj montras, ke oni lernas pli bone se oni kreas diversajn situaciojn kaj uzas vortojn, kiuj estas naturaj en la aktuala situacio. Tiurilate Stefan ne estas plene kontenta pri la unua parto de *Tendaraj Tagoj*, sed en la dua parto la "situacia metodo" estas pli evidenta, kaj la tria kaj lasta parto estas la plej bona el tiu pedagogia vidpunkto.

Adolf Burkhardt

Emerita pastro el Germanio kaj prezidanto de KELI, Adolf Burkhardt, vekis intereson kaj entuziasmon ĉe la publiko, kiam li rakontis pri la laboro trovi kaj rearanĝi esperantajn librojn por la speciala biblioteko en la urbo Aalen.

Oni povus pensi, ke prelego pri retrovado de libroj devus esti iom teda, sed Adolf Burkhardt ne prelegis. Li agis, kvaŭzaŭ li rakontus amuzan kaj streĉan fabelon en flua klara lingvo. Ni aŭskultantoj sekvis la rakontadon per grandaj oreloj kaj okuloj, kaj ni bedaŭris, ke ne venos pli da prelegoj en la programo.

Estis la sveda sekcio de KELI, kiu aranĝis la viziton de Adolf Burkhardt, unue por fari la tradician predikon en matena diservo, sed ankaŭ por prezenti lin por la ĝenerala SEF-anaro. Koran dankon por tio!

Roland Lindblom

Hjo: idilia kongresurbo kun Grönköping-etoso

En 1995 la svedaj esperantistoj okazigos sian jarkongreson en Hjo, urbeto sen esperanto-klubo kaj sen esperanto-tradicio. Taŭgas fari rapidan prezenton de la loko, kie ni venontjare kuniĝos.



La 600-jara Hjo ĉe la "skaraborga" bordo de la lago Vättern estas idilia urbeto – ĉarma kongresurbo precipe dum printempaj tagoj. Oni ankoraŭ povas uzi la urban mapon de la jaro 1696, kiam oni promenas tra stratoj kaj densaj stratetoj inter la lignaj domoj. Hjo, kun proksimume 10 000 enloĝantoj, estas konata kiel "la urbo de la lignodomoj".

De kio la urbo ekhavis sian nomon? Unu teorio estas, ke monaĥoj el Alvastra post ŝtorma veturado trans Vättern albridiĝis ĉi tie kaj en sia mezepoka latino ekkriis: *Ĉi tie situas trankvilo!* La komencaj literoj de la latinaj vortoj do fariĝis HJO...

Alia teorio estas, ke la nomo devenas de la praskandinava vorto **hjo*, kiu signifas "varia akvo".

"I love Hjo..."

Kiel ajn la nomo kreiĝis, ĝi fariĝis uzebla por ŝercoj. "I love Hjo" estas slogano por internacia turismo. Ĉiun someron la urbo aranĝas gajan "Hjovialon". Belan strandon sude de la urbo oni nomas "Hjovie-

ran". Golfkonkurso nomiĝas "Hjo-S-Open", ktp, ktp...

Vizito al Hjo estas vojaĝo tra la tempo, al tipa sveda ligna urbeto, kiel urbetoj aspektis antaŭ 60–70 jaroj. Du trionoj de la loĝantaro loĝas en malgrandaj domoj.

La urbo eĉ estas internacie premiita pro sia sukceso konservi la malnovan etoson. En 1990 Hjo ricevis la arĝentan medalon de *Europa Nostra* pro la konservado de la ligna urbo.

Ne nur muzea urbo

Sed tamen Hjo ne estas iaspeca muzeo. Ĝi estas vere vivanta urbo kun industrioj por aluminio, kartonfabrikado kaj – plej fama – ceramiko. De la jaro 1946 la cera-

mikejo "Guldkroken" danke al lertaj artistoj kaj metiistoj faris produktojn, kiuj ornamas hejmojn en tuta Skandinavio.

Oni vidas la vivantecon de la urbo ankaŭ pro sufiĉe granda novkonstruado. Sed rimarku: ankaŭ la novaj domoj estas lignaj kun same belaj detaloj, "lignaj-ista ĝojo", kiel ni esprimas tion svede. Oni gardas la heredon de la urba animo.

Laŭstranda urboparko

La urbo estas verda, parkeca. Al la parka aspekto kontribuas ĉefe la grandega urboparko, kiu etendiĝas dum kilometroj laŭ la norda strando de Vättern kun belaj vilaoj de antaŭ 100 jaroj, kun akvario, papilia muzeo, la hotelo Bellevue kaj longegaj promenvojoj inter centjaraj arboj kaj verdaj herbejoj.

La haveno estas grava por la urbo de post sia estiĝo. Kiam *Göta kanal* estis preta, Hjo decidis konstrui ŝirmitan havenon. Ĝi estis preta en 1855 kaj daŭre aspektas same kiel antaŭ 140 jaroj.

La gasthaveno havas lokon por 200 boatoj. La 100-jara ŝipo "Trafik" faras ekskursojn al Visingsö.

Alprenis la rolon de Grönköping

Grönköpings Veckoblad lokigas Grönköping inter Hjo kaj Skövde, sed Hjo alprenis tiun ideon kaj ofte agas, kvazaŭ ĝi estus Grönköping.

Se vi volas havi senton pri la bonaj flankoj de la etoso de Grönköping, tiam travivu Hjo-n! Tiun sloganon uzas la trafikinformejo de Hjo jam de jardekoj. En la urboparko eĉ estas ligna skulptaĵo de reĝo Erik Läspe kaj Halte, la sanktulo-gardisto de Grönköping...

La malavantaĝo de Hjo estas, ke neniu fervojlinio veturas tra ĝi. Nur restas muzea lokomotivo kaj vagonaro metitaj en la urban parkon. Sed Hjo estas facile atingebla per tre bonaj aŭtovojoj kaj per aŭtobuso el Skövde.

Z-



Bonege organizita Universala Kongreso



Kutima pavilono de tradicia tipo, kiu por la okazo ŝirmis la germanan paron Yoshie kaj Dieter Kleeman kaj BooMee Lindblom.

pli ol 500 japanoj, 400 koreoj kaj 280 ĉinoj en la bela konferencejo Sheraton-Walkerhill. Iom luksa komplekso de konferenclokaloj, sed tre praktika kaj konvena por Esperanto-kongreso, kiu ĉiam bezonas multajn salonojn pro la granda nombro da diversaj kunsidoj kaj prelegoj.

Kongresaj helpantoj

Kiel partopreninto de 20 antaŭaj kongresoj, mi havas eblecon kompari diversajn konsistigajn elementojn, kiuj ĉiam revenas. Unu elemento estas la funkciado de servoj, kaj ĝi dependas de la kapablo de la LKK (loka kongresa komitato) kaj de la helpantoj. Laŭ mia sperto kaj kompreno, la korea LKK faris bonegan laboron, ĉar la helpantoj kaj deĵorantoj ne nur estis multaj, sed ankaŭ agrable helpemaj kaj rapidaj. Oni ĉiam anoncis sur la pordoj de la ejoj, kio okazas interne, kaj kun tempindikoj. Neniu bezonis ĝeni kunsidojn per demandoj pri la temo.

Kun bedaŭro mi tamen devas konstati, ke la fotoservo ne havis taŭgan sistemon. Tion mi des pli bedaŭras, ĉar la prezoj estis malaltaj kaj multaj fotoj estis bonaj. Mi mendis plurajn fotojn, sed oni

Suda Koreio estas malgranda lando kun grandega ĉefurbo. Seulo havas preskaŭ 11 milionojn da loĝantoj. La ceteraj 33 milionoj loĝas sur areo 100.000 kvadratkilometroj. (Komparu kun la 450.000 kvadratkilometroj de Svedio.)

La strata bildo estas ekzotika por ni svedoj. La multaj kaj grandaj reklamta-

buloj fariĝas enigmoj pro la unika korea alfabeto. Ne multe valoras lerni la literojn, ĉar vi tamen nenion komprenos se vi ne havas tempon lerni amason da vortoj.

La modernaj apartamentoj en la altaj 20-etaĝaj domegoj tamen tute ne donas ekzotikan nuancon, ĉar ili tre similas al apartamentoj en Svedio, kun ĉiaj modernaĵoj – eĉ minitelevitilo ĉe la enireja pordo, por montri, kiu vokas por enveni!

Ankaŭ la multaj aŭtoj sur la stratoj ne aspektas ekzotikaj, sed fakte ili ĉiuj estas produktitaj en tri koreaj aŭtofabrikoj. Estas notinde, ke dum unumonata restado mi vidis entute nur 13 eksterlandajn aŭtojn – unu Mercedes, unu Lincoln, ok Volvo kaj tri Scania-kamionoj.

Malmultaj svedoj

Nur 12 svedoj kuraĝis veturi al la kongreso, kaj mi uzas la vorton kuraĝis, ĉar kelkaj personoj pensis, ke estas danĝere viziti Koreion. La koreoj mem ne komprenis tiun timon, kiun pluraj eŭropanoj sentis. Tamen okazis io, kio iomete maltrankviligis la sudkoreojn. Estis la morto de **Kim Il-Sung**, la prezidanto kaj "patro" de la nordkoreoj. La maltrankvilo estis miksitaj kun iom da espero pri pli bonaj rilatoj inter la ŝtatoj.

Inter la ĉ. 1700 kongresanoj svarmis

Fraŭlino Barlaston denove

La plej multaj kongresanoj spektis la "fraŭlinon" por la unua fojo, kaj povis ĝui kaj ridegi same multe kiel la premiera publiko en Vieno en 1992. Ankaŭ ni, kiuj vidis kaj aŭskultis pli fruajn prezentojn povis denove plene ĝui, ĉar ŝi prezentis tute novan programon. Ankaŭ la pianistino estis nova kaj, laŭ mi, eksterordinare bona. Temas pri la profesia nederlanda pianistino **Inge Lulofs**, kiu nun ekinteresiĝis pri Esperanto. Tio signifas, ke ni eventuale havos eblecon aŭskulti ŝin en Tampere venontjare. (RL)



Choi Yun Huy, respondeca en la LKK pri la artaj programeroj, havigis al si tempon por montri kiel oni "arte" dancas.

ne sukcesis retrovi ilin pro manko de funkcia sistema.

Do, feliĉe ke ĉio alia bonege funkciis. Por la unua fojo mi sentas, ke mi volas esprimi speciale koran dankon al la LKK-anoj kaj al la tre bonaj helpantoj.

Amuzo por oreloj kaj okuloj

En ĉiu kongreso okazas Internacia Vespere. Tiam aperas esperantistoj, kiuj kuraĝas prezenti ion antaŭ publiko. La kvalito de tia programo vere dependas de la unuopuloj, kiuj proponas sin. La mikso ĉi-jare estis pli bona ol kutime, ĉar estis vera varieteo kun tre diversaj eroj, kaj fortaj kaj longaj aplaŭdoj evidentigis, ke la publiko estas kontenta.

Inter la kantistoj aperis la urbestro de Kaunas en Litovio. Masko-danco akompanata de forta tamburado multe impresis la ne-korean publikon. Ankaŭ ĉi-tie aperis **f-ino Barlaston**. La publiko amas ŝin. La kuba duopo kun **Julian Hernández**, prezidanto de la Kuba Esperanto-Asocio, sukcese kreis ritman moviĝon en la kunkantanta publiko. Ĉiuj vizaĝoj ĝoje kaj gaje radiis kaj la aplaŭdoj longe tondris post la prezento.

Ne estas loko ĉi tie komenti ĉion komentindan, sed mi almenaŭ devas mencii, ke estis rara momento aŝkulti la kanton de nepala samideano.

Roland Lindblom



La ĉi-jara ILEI-konferenco okazis en la universitato de urbo Kangnam en Sud-Koreio. Sur la bildo kvar geprofesoroj de la universitato kaj plej dekstre la sekretario de ILEI, Marija Beloŝević el Kroatio. Plej proksima al Marija estas prof. So Ĵinsu, kiu aranĝis la inviton de la universitato.

La ILEI-konferenco koncertis kaj bankedis

La 28-a ILEI-konferenco okazis 30 julio–5 aŭgusto 1994 en la universitato de Kangnam, Sud-Koreio. Partoprenis 49 esperantistoj. Duono el ili venis el Azio, kaj la ceteraj el Eŭropo, Aŭstralio, Usono kaj Sudameriko. Nur Afriko ne estis reprezentata. Anstataŭe ni ĝuis ŝajne afrike varmegan veteron!

La temo de la konferenco estis "Aziaj edukado kaj kulturo". La aziaj esperantistoj raportis pri la movadoj en siaj landoj, ekz. en Mongolio, Ĉinio kaj Uzbekio, kie jam delonge ekzistas Esperanto-movado, kaj en Nepalo, Kamboĝo kaj Vjetnamio, kie la movado ankoraŭ junas. Ĉiuj spertas malfacilaĵojn kaj havas similajn problemojn. Mankas libroj, lernantoj forlasas la movadon, kiel interesigi pri Esperanto?

Televideo efikas

Tiujn ĉi problemojn oni traktas diversmaniere. Informi per televideo estas efika maniero. Post televidelsendoj en Hindio kaj Uzbekio sekvis multaj leteroj al la loka esperantistaro. Tio ankaŭ pravas, ke prepari vidbendon por instrui Esperanton

estas ne nur bona sed eĉ deviga projekto! Ni vidis parton de preparata vidbendo, *Mazi en Gondolando*, kaj ŝajnas, ke ĝi estos kontentiga sukceso.

Ni eksciis, ke en Rusio, Kazahio, Ukrainio kaj Belorusio komencis interesa lingva eksperimento iniciatita de la Akademio de Sciencoj, San Marino. Temas pri komparado de lernejaraj klasoj, kiuj dum trijara periodo studas a) Esperanton kaj samtempe duan fremdan lingvon, b) ne-niun fremdan lingvon aŭ c) iun fremdan lingvon, kiu ne estas Esperanto. Poste ĉiuj studos novan fremdan lingvon. La celo estas scienca testi la utilecon de Esperanto-konoj ĉe lernado de aliaj fremdaj lingvoj. Mi persone kun granda intereso atendas la rezulton, ĉar gravas scienca pruvi tion, kion ni ofte fanfaronas!

(Por pliaj informoj pri la eksperimento kaj eventuala kunlaboro, turnu vin al: Irina Gonĉarova, ul. Molodjojnaja 38-10, Odincovo-2, RUS-143000, Rusio.)

Ekzameniĝu ankaŭ vi!

ILEI-konferenco, kompreneble, estas plejparte komitatkunsidoj, Ĉe-seminarioj kaj ekzamenoj. La tempo ne sufiĉis por ĉio, tial mi elektis aliĝi al la aro de ekzamenoj. Tio signifis studi kaj refreŝigi miajn konojn pri la movado kaj literaturo esperantaj. Tamen mi sukcesis, kaj nun fiere posedas atestilon pri la Meza Ekzameno de Esperanto! Trapasi ekzamenon kaj membriĝi al ILEI plifortigas la Ligon kaj plialtigas la prestiĝon de Esperanto. Faru kiel mi, faru pli bone ol mi!

Cetere ni ne nur diligente kunvenis, studis, babiladis kaj ekskursis al nacia vilaĝo — ni eĉ bankedis. La prezidanto de la Universitato Kangnam regalas nin per vespermanĝo en luksa hotelo. Kion ni manĝis, mi ne povas klarigi. Mi diras nur, ke estis multvaria, strangaspekta, bongusta kaj belarangita manĝaĵo! Certe tio helpis malkaŝi la talentojn de la ĉeestantoj, ĉar komencis koncerto, al kiuj ĉiuj kontribuis! Tiu mirinda koncerto ankoraŭ sonas en mia kapo!

Anita Bergh

NU KAN DU ANMÄLA DIG TILL VÄRLDSKONGRESSEN I TAMMERFORS 22-29 JULI 1995

Kongressavgifter i svenska kronor:

Kategori	till	till	efter
	94-12-31	95-03-31	95-04-01
Ej direktmedlem i UEA	1220	1530	1810
Direktmedlem i UEA (ej MG)	970	1220	1460
Medföljande, handikappad eller ungdom (under 30 år 1995-01-01) som ej är direktmedlem i UEA	730	910	1090
Medföljande, handikappad eller ungdom som är direktmedlem i UEA	490	610	730

Handikappassistenter och ungdomar födda efter 74-12-31 betalar ingen kongressavgift.

Avgifterna kan komma att justeras uppåt i händelse av kursändring.

Anmälningsblanketter för kongressen kan beställas hos: Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel: 0415-501 52.

Blanketten skickas tillbaka till samma adress.

All betalning sker till Esperantoförbundets specialkonto, Hörby, pg 14 74 29-5.



Esperanto- parlamento kunsidis en Seulo

Ni, la kompatindaj UEA-komitatoj, ĉiam devas kunsidi dum multaj horoj en ĉiu UK. Ne nur en la komitatkunsidoj, sed ankaŭ en tiuj de la diversaj komisionoj kaj en aliaj, kiuj koncernas la movadon. Ni ne estas kompatindaj pro la devo partopreni kunsidojn, ĉar tiu parto estas tre grava kaj interesa, sed ni estas kompatindaj en tiu senco, ke ni perdas la eblecon partopreni en aliaj interesaj programejoj.

Raportinda estas, ke **Ian Jackson** pro profesiaj kaŭzoj devis demisii de sia posteno kiel ĝenerala sekretario. Anstataŭ alelekti novan estraron, la komitato transdonis tiun taskon al estrarano **Mark Fettes**. Post unu jaro en Tampere okazos la elektoj de nova estraro por la sekvonta trijara periodo. Tiam **John Wells** devos retiriĝi de sia posteno kiel prezidanto, ĉar lia dua periodo finiĝos, kaj la statuto de UEA permesas nur du sinsekvajn periodojn de prezidanteco.

UEA perdis multajn membrojn en orienta Eŭropo ekde la grandaj politikaj ŝanĝiĝoj tie. Kelkaj landaj asocioj perdis la ritmon, aliaj komencis reorganizi sin por labori laŭ novaj ideoj kaj argumentoj, kaj oni povas atendi, ke la restantaj aktivuloj iom post iom refortiĝos.

UEA estas nia granda montrofenestro al la ekstera publiko, kaj ĝi bezonas ĉiam pli kaj pli da membroj por montri, ke ni iras antaŭen. Pro tio mi admonas vin fariĝi rekta membro de UEA por 1995, precipe se vi intencas viziti la kongreson en Tampere. UEA-membroj ja ĝuas konsiderindan rabaton de la kongreskoto!

Roland Lindblom

Multa sidado. Meze sur la bildo tri svedaj komitatoj (Märtha Andréasson, Anita Bergh kaj Roland Lindblom) dum unu el la multaj komitatkunsidoj dum la UK en Seulo.

Entuziasmo el la koro de Afriko

Dum la kongreso en Seulo mi renkontiĝis kun Horst Gruner, pri kiu mi multe aŭdis post lia alveno al Daresalamo. Li tre aktive laboras por la Esperanto-movado en Tanzanio kaj sekve bone konas la kondiĉojn en la lando. Liaj konsiloj pri Esperanto en Afriko estas tre valoraj por ni, kiuj havas ĝemelajn rilatojn kun Esperanto-kluboj en Tanzanio. Jen lia rakonto pri la dua Tanzania Esperanto-kongreso en Mwanza ĉi-jare. Ĉu ne allogas vin la pinto de Kilimanĝaro?

Anita Bergh

La Viktoria lago devis aperi en la novajelsendoj pro la miloj da homaj kadavroj el Ruando, kiuj ĝin infestis. Ne tro for de tie okazis io pli esperiga, almenaŭ por la afrika Esperanto-movado:

Inter la 11-a kaj 16-a de junio okazis la dua Tanzania esperanto-kongreso en la urbo Mwanza. En lernejo belege situanta apud la lagobordo kunvenis ĉ. 35 junuloj el la tuta lando. Helpe de la Afrika Fondaĵo de UEA eblis senkosta partopreno de po unu reprezentanto de eble 15 kluboj, plus de aliaj unuopuloj kaj tuta grupo el la urbo Mwanza mem.

La plej multaj partoprenantoj sekvis intensan kurson pri Esperanto-gramatiko. Alia laborgrupo prilaboris korektoliston por la dua eldono de la UEA-vortaro svahila-esperanta. Multan tempon pre-



Horst Gruner

nis ankaŭ la organizaj kunvenoj.

Elektiĝis nova estraro: Reelektiĝis s-ro **Mramba Simba** kiel prezidanto kaj s-ro **Costantine Mashauri** kiel sekretario. Nova estas s-ro **Sao** kiel kasisto. Li estas la sola nejunulo en la asocio. Lerninte Esperanton de **Tibor Sekelj**, li fondis la tiaman Tanganjikan Esperanto-Asociacion. Poste li longe ne aktivis. Sed nun, preskaŭ pensiulo, li entuziasme volas kontribui. Nova estas ankaŭ f-ino **Nyambona Massamba**, unu el la tri virinoj en la kongreso. Ŝi elektiĝis kiel vicsekretario. Nyambona estas radio-ĵurnalistino kaj faris

raportojn, kiuj aŭdeblis tutlande kaj eĉ logis pliajn esperantistojn al la kongreso.

Mi mem estis la sola eksterlanda partoprenanto. Laborante en Daresalamo, mi povis facile liberiĝi dum du semajnoj por ĝui la kongreson kaj la Viktorian lagon. Matene mi instruis Esperanton, posttagmeze mi pagajis sur la lago. Ĉe Mwanza la lago estas belegra. Rokoj, insuloj, insuletoj kaj golfoj formas labirinton, en kiu oni povas tre bele boatumi, soli kaj observi bestojn. Cetere tiu lago estas grandega kiel maro. Morto kaj vivo, milito kaj paco povas sur ĝi samtempe senĝene. Revoje al Daresalamo mi trapasis Serengeti, Ngorongoro kaj aliajn el la plej belaj naturrezervejoj de la mondo.

Tiajn turistajn plezurojn tamen ĝuis nur mi. Al la aliaj mankis ĉefe mono por fari tiajn ekskursojn. Monon por kongresi en movada maniero posedas preskaŭ neniu el la asocioj. Monomanko estas ofta temo de diskutoj. Kiel la asocio estonte farus kongreson, se ne venus helpo de UEA? Respondo ne troviĝis.

Ĝis nun Esperanto en Tanzanio plej allogis vilaĝanojn – terkultivistojn, metistojn, instruistojn. Por ili Esperanto senkonkurencas kiel facila kaj ofte tute senkosta lernaĵo promesanta esperon je letoramiko el la riĉa mondo. Elde la kampaĵo la movado en Tanzanio tamen ne povos vere memstariĝi. Por tio necesas la malfacila varbado en la urboj, por interesi la tie vivantajn profesiulojn.

Principe la asocio intencas apliki tian strategion. La nova estraro havas pli fortan bazon en la ĉefurbo Daresalamo, kaj tie ekde ĉi tiu jaro okazas regule varbado kaj lingvokursoj.

La movado en Tanzanio rapide kreskis dum ĝiaj nur du jaroj de organizita ekzisto. Kredeble ni estonte aŭdos pli el tie. Eksterlandaj vizitantoj bonvenas. Kiu kuraĝas ekkoni veran afrikan vivon ĝuos esti gasto ĉe la Esperanto-kluboj.

Eble baldaŭ prezentos sin okazo por tia vizito: La kongreso decidis inviti al la Kvara Afrika Kongreso, okazonta en la urbo Moshi apud Kilimanĝaro, la plej alta monto de la kontinento.

Horst Gruner

Dum la ĉi-jara UK en Seulo okazis kunsido pri la agado por Esperanto en Afriko. La kunsidon gvidis Horst Gruner, kaj ĝin partoprenis ĉ. 40 personoj, kiuj interŝanĝis spertojn pri la Esperanto-movadoj en diversaj partoj de Afriko. Oni konstatis, ke la kondiĉoj por Esperanto-agado, kaj la socia fono de la lokaj esperantistoj, multe varias inter la diversaj regionoj de la kontinento.

Konsento regis pri la fakto, ke el Afriko povas veni valora kontribuo al la tutmonda Esperanto-movado, do subteno al la junaj Esperanto-organizoj ja indas. Per celkonscia varbado inter urbaj profesiuloj kaj per forta emfazo pri kvalito anstataŭ kvanto de Esperanto-parolantoj, Afrika Agado devas kontribui por evoluigi plejeble memstarajn kaj lokajn organizojn.

Oni konstatis, ke donacoj al la Afrika Fondaĵo de UEA pli utilas, ol tiuj al unuopaj petantoj.

(Laŭ Kvieta Mateno, kongresa kuriero de la UK en Seulo)

Franca ĥoro vizitis min per Esperanto

Printempan tagon en aprilo la telefono sonoris, kaj la gaja voĉo de **Kaisa Hansen** rakontis pri vizito de franca ĥoro. Inter alie ili planis viziton al Katrineholm por koncerti en preĝejo. Unu el la membrinoj, **Pierrette Formen**, volis konatiĝi kun esperantistoj dumvoje. Mi tuj ŝatis la ideon, ĉar mi volonte renkontas novajn amikojn, kaj mi konas duonon de la ĥorkantistaro de mia urbo. Tio ĉi estus bona okazo montri al ili la bonan funkcion de Esperanto en ordinara vivo.

Do, la franca ĥoro alvenis al Katrineholm, bone kaj sukcese kantis. Jam antaŭe la svedaj kantistoj informiĝis, ke Pierrette volis renkontiĝi kun mi. Multaj personoj montris al mi, sed fakte mi mem portis esperantan ŝildon, kie inter alie estis skribita "Saluton". Poste mi kaj Pierrette multe parolis. Ni ankaŭ interpretis inter la franca kaj sveda lingvoj, ĉar ne multaj svedoj komprenis la francan kaj multaj francoj ne (sufiĉe bone) parolis la anglan.

La duan tagon Pierrette kaj ŝia edzo Henri vizitis mian hejmon, kaj en la ĝardeno ni fotis unu la alian, post eta koncerto de Pierrette sur mia piano. Poste mi veturigis ilin al la aŭtobuso, kiu transportos ilin al Jönköping por la sekvonta koncerto. Tro mallonga vizito, sed venontjare ni eble renkontiĝos denove.

Agneta Emanuelsson



Francaj gastoj. Henri kaj Pierrette Formen en la ĝardeno de Agneta Emanuelsson en Katrineholm

Sukcesaj Baltregionaj Esperanto-Tagoj

La Baltregionaj Esperanto-Tagoj (BET) okazis ĉi-jare la 30-an fojon. Dum unu julia semajno kolektiĝis 100 partoprenantoj en la ban- kaj kuracurbo Pärnu en suda Estonio. Mi mem kun la edzo Nils-Erik estis la solaj svedoj. Partoprenis ankaŭ kelkaj finnoj, poloj kaj germanoj. Rusoj ne plu venas amase, kredeble pro manko je volo kaj mono. La iamaj sovetunianoj antaŭe bezonis esperantajn organizojn por ebligi vojaĝpermesojn al fremdaj landoj kaj regionoj, sed nun ili rajtas libere vojaĝi.

La Tagojn gvidis **Peter Aitai**, bonega esperantisto kaj organizanto. Fakte ne ekzistis skribita programo, sed ĉio iris glate kun altkvalitaj prelegoj kaj kulturaj programeroj en la ejo de la humanisma gimnazio de Pärnu.

Ĉu vi iam aŭdis prelegon pri flagoj? La unua prelego dum BET temis pri la blunigra-blanka estona flago.

"Esperantistojn ni devas trovi, ne fari", diris sperta Esperanto-instruisto dum diskuto pri la disvastigo de Esperanto.

Vespere en la kelo de la gimnazio nin amuzis kongresanoj, i.a. rusa baletistino el Moskvo kaj kantistino el Litovio. La afabla pedelfamilio de la gimnazio prizorgis por ni manĝaĵojn ekde la mateno ĝis la vespero. Ni trinkis bieron, kune kantis kaj dancis.

Dum varmegaj tagoj ankaŭ troviĝis tempo promenadi laŭlonge de sablaj strandoj en Pärnu kaj naĝi en pura akvo. Multe ŝatata estis la tuttaga ŝipekskurso al la insulo Kihnu kun konservita tradicioj kaj naturo stampita de la maro. Alia naturvidindaĵo, precipe por ni svedoj, estis la cikonioj en la sudestona kampara pejzaĝo.

Ĝis revido Estonio, nia nun facile atingebla najbara lando!

Kerstin Kristoferson

Pettyn en Skövde

Skövde estis la dua punkto dum la svedia rondvojaĝo de **Andreo Pettyn**, bone konata estro de la Esperanto-elsendoj de la Pola Radio. Lian prelegon en la ABF-domo kune aranĝis la Esperanto-klubo de Skövde kaj la studasocio ABF.

Multaj Skövde-anoj estas sufiĉe spertaj Polland-vojaĝantoj, kaj des pli interesaj estis do la informoj, kiujn Andreo Pettyn donis pri la nuntempaj cirkonstancoj en sia lando. La demandoj estis multaj kaj variaj post la prelego kaj dum la amika kunestado poste.

La pola gasto restis kelkajn tagojn en Skövde. Interalie li havis okazon viziti la Volvo-fabrikon sub gvidado de **Sten Broman**, kiu laboras tie.

Koncerteca informado

"Mondlingvo sen propra lando". Sub tiu titolo aperis granda artikolo pri Esperanto en la stokholma sekcio de la plej grava ĵurnalo de Svedio, *Dagens Nyheter*, dimanĉe la 18-an de septembro. Ne nur estis bone kaj pozitive priskribitaj la lingvo kaj movado, sed ankaŭ aperis invito al informkunveno pri Esperanto en la centro de Stokholmo la saman tagon je la 16-a horo.

Al la informkunveno venis ĉ. 40 personoj, el kiuj deko estis neesperantistoj. La redaktoro de la Pola Radio, **Andreo Pettyn**, prelegis kaj instruis Esperanton al komencantoj.

Post la leciono sekvis prelego, en kiu

Andreo Pettyn lerte gvidis nin en la historion de esperantaj kantoj kaj muziko. Li aŭdigis al ni belsonajn specimenojn de diversnaciaj artistoj. Ni ankaŭ ekkonsciis, ke la himno "La Espero" povas esti ludata kaj kantata tiel malsame, ke ĝi fariĝas preskaŭ nerekonsebla, tute depende de la orkestro aŭ kantgrupo!

Fine de tiu ĉi tre agrabla koncertsimila vespero ni aŭskultis la marŝon "Vivu Esperanto", komponitan de **Sam Rydberg** en la jaro 1934. Ĉu li komponis la marŝon okaze de la Universala Kongreso en Stokholmo en tiu jaro? Kiu li estis? Ĉu iu leganto scias?

Anita Bergh

Ekzamenoj ankaŭ en Finnlando

Komence de julio mi partoprenis kurson en la somera universitato de Jyväskylä, Finnlando. La kurso okazis jam la 27-an fojon. La celo estis prepari la partoprenantojn al la internacia UEA/ILEI-ekzameno je la elementa kaj meza niveloj.

La kursejo estis la Kristana Instituto de Jyväskylä, kaj tie la partoprenantoj loĝis komforte kaj manĝis bonguste. Estis favoro, ke ĉiuj aktivecoj okazis en la sama ejo, sed eksterlandanoj ankaŭ havis eblecon konatiĝi kun la urbo kaj ĝiaj vidindaĵoj. Entute ni estis 18 kursanoj. La plimulto estis finnoj kaj la eksterlandanoj venis el Hungario, Belgio, Rusio kaj Sve-

dio. La ekzamenan preparkurson gvidis la hungarino **Márta Kovács**. Samtempe okazis ankaŭ kurso por komencantoj kaj tiun gvidis **Raita Pyhälä**. Ambaŭ estas profesiaj lingvoinstruistoj kaj spertaj kursgvidantoj.

Dum unu semajno ni intense studis en amika atmosfero kaj en la semajnfino okazis la ekzamenoj. Pluraj finnaj instruistoj alvenis nur por trapasi la ekzamenojn, kaj tio atestas, ke la finnlandanoj nun vere serioze preparas sin por venontsomere akcepti la mondkongresanojn en Tampere.

Mi sincere rekomendas al sveda esperantistoj partopreni studsemajnon ie en Finnlando. Vi certe ne pentos tian decidon.

Gun Gerdman

Besök från Polen

I början av sommaren kom 35 esperantistoj till Karlskrona med färjan från Gdynia i Polen. Ungefär hälften av dem var barn och ungdomar som vunnit artistävlingar som ordnats av esperantoavdelningar vid olika kulturcentra i Polen.

I Karlskrona uppträdde barnen med sång, musik, dans och teater vid ett par offentliga föreställningar. Programmet framfördes helt på esperanto, med bara några informationer på svenska.

Under sitt två och en halv dag långa besök hann de polska gästerna också att under en eftermiddag och kväll umgås med svenska esperantister från Kristianstad, Växjö, Karlskrona, Kalmar, Oskars-

hamn med flera orter. På programmet stod sång, lek, dans och poesiläsning. Dessutom turistade man i Karlskrona, och besökte bland annat stadens vackra gamla gymnasiebyggnad, vars bibliotek dagen till ära fick Ebbe Vilborgs svensk-esperantiska ordbok i gåva av lokala esperantister.

Sam Fritz i Karlskrona och **Kerstin Rhodin** i Högsby var två nyckelpersoner bakom detta förbrödande och stimulerande esperantobesök.

Henrik Wachtmeister

Sommarutflykt

Östgötaesperantisternas traditionella försommarutflykt gick i år till Malexander. Linköpingsklubbens ordförande **Arne Karlsson** hälsade de 21 deltagarna välkomna vid den inledande lunchen på pensionat Sommarhagen, varefter kyrkan och hembygdsgården besågs. **Ulf Ribers** visade Heliga Birgittas gård Aspenäs, som på hans initiativ rustats upp och flyttats till kyrkbacken. De mest utställiga avslutade dagen med att lyssna till kören Bonevox från Köpenhamn, som gav en fin konsert i kyrkan. Namnet låter som kökslätan eller transpiranto, men är danska och betyder bonvax.

Haldo Vedin

Danko de Ebbe Vilborg

Ricevinte la informon, ke mi fariĝis honora membro de SEF, mi tute konsterniĝis, ĉar mi ja konscias, ke mia esperantista agado ĉefe okazis ekster la federacio aŭ en aliaj forumoj (ekz. Sveda Esperanto-Instituto). Mi pasigis kelkan tempon serĉante kialon por mia honorposteno, sed ne sukcesis. Tio kompreneble ne malhelpas min alte taksi tiun dignon enkadre de la plej grava Esperanto-organizaĵo de nia lando. Mi esperas daŭre trovi labortaskojn, kiuj iurilate estos utilaj por la sveda Esperanto-movado.

Kun danko al la SEF-membraro,

Ebbe Vilborg



Svenska och polska esperantister under besöket i Karlskrona

Prago gastigos la UK-on en 1996

Estas ĉiam la estraro de UEA, kiu intertraktas kaj decidas pri la Universalaj Kongresoj. En Seulo la estraro informis, ke la 81-a UK okazos en la ĉeĥa cefurbo Prago. Post tio, en la jaro 1997, estos tempo vojaĝi al la kontinento Aŭstralio, kaj pli precize al la urbo Adelajdo. Faru ŝparplanon jam nun!

Stipendio Ivo Lapenna

Memore al prof. d-ro **Ivo Lapenna** (1909–1987) kaj al liaj elstaraj meritoj por la Internacia Lingvo ĝenerale kaj ties aplikado en la sciencoj speciale, **Fondaĵo Ivo Lapenna** starigis *Stipendion Lapenna*.

La Stipendio konsistas el subvenciado al disertacioj je universitata nivelo (doktoriĝoj, magistriĝoj, licencioj), kiuj temas pri esperantologio kaj/aŭ pri Esperanto en rilato kun interlingvistiko kaj estas ellaboritaj en la spirito de L.L. Zamenhof kaj Ivo Lapenna.

En 1994 la Stipendio ne estis aljuĝita.

En la jaro 1995, Stipendio Lapenna ree povos esti aljuĝita por disertacioj oficiale akceptitaj de universitata instanco en la jaro 1994.


Aŭtoroj dezirantaj kandidatiĝi al la Stipendio, bv. peti la detalan regularon de la sekretario-kasisto de Fondaĵo Lapenna: **S-ro Torben Svendsen, Vanløse Allé 57, DK-2720 Vanløse, Danlando**.

Tempolimo por la transsendo de la faklaboraĵo en du ekzempleroj estas fino de februaro 1995. Adreso: **D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio**.

Nordsuda vojaĝo

De Finnlando tra la baltaj landoj al Pollando vojaĝis **Kerstin Rhodin** kaj **Harold Brown** en la lastaj du semajnoj de aprilo.

Nobelpris till esperantist



Reinhard Selten – Nobelprisad esperantist

En av jaro tre Nobelpristagare i ekonomi, tysken **Reinhard Selten**, är esperantist. Selten, som är professor i ekonomi vid universitetet i Bonn, har tilldelats priset för sina bidrag till den s.k.

Nia unua celo estis partopreni seminarion en la urbo Porvoo (Borgå) pri nordiaj fabeloj, kiun organizis finnlandaj esperantistoj. Kontribuantoj prelegis pri H.C. Andersen, Tove Jansson kaj la fratoj Grimm. Kerstin prelegis pri Astrid Lindgren. La seminario provizis okazon denove renkonti finnlandajn esperantistojn kaj lerni iom pli pri la lingva situacio en Finnlando.

Trapasante Helsinki, ni vizitis svedkaj anglalingvan lernejon, kie ni parolis pri Esperanto. De Helsinki ni iris ŝipe al Tallinn, renkontis amikojn kaj kaptis la ŝancon viziti la urbon Haapsalu kaj la svedlingvan lernejon en Noarootsi (Nuckö). Poste sekvis la urboj Pärnu, Viljandi, Tartu, Riga kaj fine Kaŭnas en Litovio. En ĉiu loko ni prezentis programojn en Esperanto. En la altlernejo de Kaŭnas Harold parolis kun la studentoj

icke-kooperativa spelteorin, som beskriver hur olika aktörer på en marknad kan spela ut varandra och de jämviktslägen som kan bli resultatet av deras respektive handlingsstrategier.

I en intervju i den amerikanska tidningen *New York Times* har Selten beskrivit sig själv som "idealist och esperantist". Han har också publicerat böcker på esperanto, bl a en med prof. Jonathan Pool om esperantoundervisning.

När nyheten om Seltens Nobelpris blev känd, fick han naturligtvis många gratulationstelegram från hela världen. Ett kom från kollegan **Ingolf Ståhl** vid Handelshögskolan i Stockholm, som dagen till ära författade sitt telegram på esperanto, ett språk som han enligt egen utsago lärt sig i början av 1950-talet.

Selten är inte den förste esperantisten att få Nobelpriset. Enligt UEAs tidning *Esperanto* har sedan 1906 – när den förste esperantisten blev "prisad" – flera fått komma till Stockholm i detta angånämna ärende.

pri la nuna ekonomia situacio en Britio.

De Kaŭnas ni vojaĝis al Pollando kaj la urbo Bydgoszcz por enkonti la muzikistojn kaj laj la dancogrupon, kiuj preparis sin por veni al Karlskrona kiel gastoj dum la regiona renkontiĝo Småland-Blekinge (vidu raporton aliloke en la gazeto). En Bydgoszcz nin atendis surprizo, ĉar montriĝis, ke ĝuste tiam tie okazas semajno de prelegoj sub la aŭspicio de la Akademio Internacia de la Sciencoj de San Marino (AIS). Tiel eblis al ni partopreni ege interesan programon pri la lingvoscienco kaj pri la rilatoj inter la individuo kaj la socio (temo tre aktuala en orienteŭropaj landoj).

La vojaĝo, krom esti plezuro, refreŝigis niajn kontaktojn kun Finnlando kaj la baltaj landoj.

Harold Brown

Eble hodiaŭ, eble morgaŭ

La 11-an de julio mi enpaŝis en Aeroflot-aviadilon al Peterburgo. La fina celo estis Kislovodsk en la Kaŭkaza montaro. Mi petis Anita Dagmarsdotter esti mia akompanantino. Mi demandis min, ĉu ŝi dum la lastaj semajnoj pentis sian konsenton. Dufoje dum la lastaj monatoj krimuloj faris atakojn en la flughaveno Mineralni Vodi, ĝuste nia destino. La tria atako okazis unu semajnon antaŭ nia alveno. La plej multaj okcidentlandanoj ŝanĝis siajn planojn pro tio, kaj pro la multaj ĵurnalraportoj pri la nesekureco de la rusa flugtrafiko. Sed kiam miaj plurjaraj amikoj en Kislovodsk prenis sur sin la taskon aranĝi kongreson spite al ĉiaj kontraŭaj cirkonstancoj, mi promesis veni, eĉ se mi devus promeni. Mi do ne havis elekton.

Ombrela firmao

En Peterburgo nin akceptis reprezentantoj de la firmao Universo. Ĉar nur ni du venis pere de Peterburgo, oni ne mendis por ni hotelajn ĉambrojn, sed loĝigis nin en la ejo de la firmao. Universo ŝajnas esti ia ombrela organizo por diversaj agadoj. Turista servo, por homoj sen tro altaj postuloj, sed la ĉefino Anna laboras pri tradukado inter la pola kaj rusa lingvoj inter siaj kuiraj kaj ceteraj mastrumaj

taskoj. Alia persono havas similan laboron, dum Valeria flegas potoplantojn por vendi en la urbo. Cetere la ejo servis ankaŭ kiel Esperanto-centro.

La ejo en Bolŝoj prospekt 102 valorus propran ĉapitron. Nun mi nur diras, ke iam luksa loĝejo el la jaro 1900 post 70-jara loĝado de pentraj artistoj kaj sen ĉia riparado kaj subtenado ne plu estas luksa ejo en 1994. Pro la sportaj ludoj kun Usono inaŭgurotaj la 23-an de julio, oni ĉarpentis, masonis kaj farbis en la koncernaj partoj de la urbo, sed nia adreso situis ekster tiu distrikto kaj devis atendi. Pro tio i.a. mankis varma akvo, sed dum la ĉi-somera varmo la duŝa akvo ne estis tro malvarma.

"Eble morgaŭ"

Post unu nokto ĉe niaj vere afablaj gemastroj ni veturis al la flughaveno por aŭdi, ke aviadilo al Minvodi ne laŭplane iras hodiaŭ, marde, sed nur ĵaŭde. Do du pliaj diurnoj en Peterburgo. Ĵaŭde ni telefonis por aŭdi, ke "la aviadilo eble iros hodiaŭ, eble morgaŭ". Post duhora atendado restis nur "eble morgaŭ".

Kion fari? Post multa parlamentado helpe de Anna el Universo, ili rekomendis al ni flugi al Rostov ĉe Don. Ni ŝanĝis la biletojn. Veninte al Rostov ni estis nur

350 kilometrojn for de Kislovodsk. Post kelkhora atendado en la fervoja stacio venis litvagonaro el Moskvo destinita al Kislovodsk. Nu, litvagonaro ne sentiĝis tute superflua por tiu 12-hora (!) restanta vojaĝo.

Fine ni alvenis al moderna hotelo kun duŝo en la ĉambro. Imagu, duŝo en la propra ĉambro! Tiam oni preskaŭ povas ignori la faktan, ke en la kranoj mankas kaj varma kaj malvarma akvo. Tia lukso fluis nur inter la 7-a kaj 9-a horoj matene kaj la 19-a kaj 22-a vespere. "Pro tio ja staras sitelo en la duŝejo, por ke vi havu por ceteraj horoj." Nu jes, ni ja al kutimiĝis.

Sed restado en Esperantujo ĉiam estas pozitiva travivaĵo. La ĉeftemo de tiu ĉi IKBE (Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj) estis "La brajla skribo nuntempe kaj estontece". La okcidentlandanoj estis malmultaj, sed el sep diversaj landoj. La rusoj kaj homoj el cetera iama Sovetio ja estis granda plimulto. Entute ni estis 123 partoprenantoj.

Ukrainia "Lindkvist"

Ĉiam oni ligas novajn kontaktojn. Mi devas rakonti pri la geedza paro Lindkvist el Ukrainio. Fakte ili nomiĝis Muhammedschin, sed antaŭ ol mi lernis tiun nomon, mi diris al Anita: "Tiu lingvisto el Ukrainio, ni ja povas nomi lin Lindkvist." Tion mi rakontis al li. Nu, li kaj alia persono el la rusa urbo Samara volis studi la svedan, kaj petis min sendi vortarojn. La lastan vesperon Vadim Muhammedschin venis al mi kaj prezentis sin: "Bonan vesperon, estas Lindkvist."

Antaŭ nia (planita) flugo al Minvodi, iu afabla peterburgano deziris al ni feliĉan vojaĝon per la vortoj: "Ni esperu, ke niaj karaj krimuloj ripozas ĝuste nun." Jes, tion ili fakte faris, sed malpli ol unu semajnon post nia reveno hejmen ili faris novan atakon.

Fine mi volas diri, ke la babilado pri nesekura rusa flugtrafiko certe estas iom troigita. Almenaŭ nia aviadilo ne paneis.

Ne, plej fine mi volas diri, ke mia rakonto ja havas leĝeran, ŝercan tonon, sed mia plej grava impresado de la vojaĝo estas, ke la rusoj nun havas tre pezajn kondiĉojn, precipe pro la terura ekonomia situacio. Kion ni povas fari por helpi almenaŭ kelkajn? La lando estas giganta, sed konsistas el unuopuloj. Ni i.a. konsideru la aferon antaŭ la venonta UK en Tampere.

Unueco n-ro 1

Estis iam juna nove bakita instruistino, kiu fariĝis populara inter la lernantoj. Ŝiaj kolegoj estis iom ĵaluzaj kaj diris:

– Ŝi estas la plej juna instruistino, pro tio la lernantoj ŝatas ŝin.

Kiam ŝi fariĝis mezaĝa, ŝi daŭre estis populara, kaj la gekolegoj diris:

– Tio estas ĉar ŝi estas ne tiel juna kiel stulta fraŭlino, nek maljuna kiel ruza vulpo.

Ŝi daŭre restis populara, kiam ŝi fariĝis pli ol 40-jara. Tiam la kolegoj diris:

– Tio estas ĉar ŝi estas maljuna kaj la

lernantoj sentas, ke ŝi prizorgas ilin kiel patrino.

Poste ŝi translokiĝis en alian landon, iu verda lando. Ankaŭ tie ŝi sukcesis en sia laboro. Tiam la konatuloj diris:

– Tio estas ĉar ŝi estas eksterlandano, ŝi havas pli da ŝanco sukcesi ol enlandano.

Kiam ŝi malsukcesis, ili diris:

– Jes, kompreneble. Fariĝis tiel, ĉar ŝi estas eksterlandano!

Falpupeto

Birger Viggen

Longa paŭzo...

Pro la interveninta svedlingva informnumero kaj kroma malfruiĝo ligita al ĝi, la paŭzo inter la traduktasko en *La Espero* 2/94 kaj la ĉi-numera solvopropono fariĝis ekstreme longa. Ni esperas, ke la pacienco de niaj fidelaj legantoj kaj tradukemuloj ne tute elĉerpiĝis pro tio.

Ĉar la venonta numero (espereble) venos tre baldaŭ post tiu ĉi, ni nun ne donos novan traduktaskon, sed atendos ĝis tiam. Vi do dume povos ĝui ankoraŭ ion da ripozo, aŭ kapti la okazon akriĝi viajn kraĵojn, studi viajn vortarojn kaj trejni vin per memelektitaj tekstoj.

Ni tamen ankaŭ nun tre volonte ricevas leterojn de vi, sed ĉi-foje kun komentoj kaj opinioj. Ne gravas, ĉu vi iam partoprenis en la tradukado aŭ ne. Vi povas helpi nin fari ĉi tiun rubrikon pli bona.

Se vi partoprenis – ĉu vi trovis la tekstojn bone aŭ malbone elektitaj? Ĉu la komentoj utilis aŭ enuigis?

Se vi ne partoprenis – ĉu vi eble tamen legas la rubrikon, aŭ ĉu ĝi estas tute seninteresa por vi? Ĉu vi pensas, ke ankaŭ tiuj, kiuj mem ne partoprenas, povas lerni ion de la solvoj kaj komentoj? Ĉu ni povas fari ion, por ke ankaŭ vi sentu vin motivita aktive traduki kaj sendi vian solvon?

Ni pensas mem, ke la tekstoj ĝis nun estis relative malfacilaj, kaj volas en la venonta numero provi tekston, kiun ni taksas iomete pli facila. La intenco estas poste alterni inter diversnivelaĵoj tekstoj. Kion vi opinias? Ĉu tio estas bona aŭ malbona ideo? Ĉu pli multaj sentus emon partopreni?

Skribu al ni sub la adreso de **Per Aarne Fritzson** (adreso sur p. 2). Ĝis tiam, kore salutata

*Per Aarne Fritzson
Bertil Wennergren*

Sube sekvas propono de traduko de la teksto en La Espero 2/94. (Ĝi estas kompilita el esprimoj el la alsenditaj tradukaĵoj, krom en tiuj kazoj, kiam ni havas fortan motivon rekomendi alian vortumon.) Oblikva streko (/) apartigas du aŭ pliajn alternativajn tradukojn de iu esprimo aŭ frazo. Angulaj krampoj, kiel en "lern-ejstr[in]o", indikas eblan sed ne nepran aldo-

non. La ciferoj referencas al la subaj komentoj. (Se vi malkonsentas pri io, ni bonvenigas viajn reagojn!)

Unu el la grandaj ĉi-jaraj

"Tango Lima" de Eva Ginsburg kaj Peter Torbiörnsson estos konsiderata kiel unu el la grandaj dokumentaj filmoj de la jaro kaj jardeko/de la naŭdekaj jaroj. Ĝi temas pri la sveda deka kompanio en Tuzla, Bosnio.

Ĉiam sentiĝas iel nedece priskribi, analizi kaj recenzi tiajn ĉi filmojn/filmojn ĉi-specajn, ĉar tio neeviteble signifas/implicas, ke oni transformas real[a]ojn de homa vivo/ekzistado¹ kaj nekompareblajn travivaĵojn/spertojn en estetikan objekton². Sed ne ekzistas vojo por tion eviti. [Nur] la filmon mi vidis. La real[a]on tie for³ mi ne povas atingi, nek recenzi.

Komenciĝas idilie kaj paradmilitiste en la sveda hejmlando⁴ kun trejnado kaj dreskeercado, strikta disciplino kaj senriproĉaj/bone prizorgitaj uniformoj. La kaskoj estas tiel brilaj kaj blujaj. "Bonan tagon, UN-soldatoj", krias la leŭtenanto. "Bonan tagon, leŭtenanto", responde krias ĉiuj soldatoj, kaj ĉio estas ankrita/radikas profunde en filma kliŝo bone konata, sekura kaj eluzita/trivita.

Poste ni subite trovas nin en alia real[a]o, kie ĉio malsamas, kie la uniformoj perdis sian brilon kaj la ridoj fariĝis historie fortaj/enormaj. La klostrofobio kunpremas la rigardon⁵, kaj la teruro, la naturo mem, ŝajnas transformi la ekzistadon en dezertan pejzaĝon de neĝokaĉo kaj malespero.

1. Ŝajnis al ni plej bone parafrazi la originalan "ekzistenciel verklighet", ĉar en Esperanto mankas *fiksita* esprimo, kiu laŭ sia senco senambigue respondus al la sveda "ekzistenciel".
2. Multaj tradukis "al estetika objekto". Laŭ PIV kaj PAG, tia uzo de la prepozicio "al" estas escepta, dum la normala prepozicio por esprimi la staton post aliĝo estas "en" (kun sekvanta akuzativo): "lia malkaŝemeco aliformiĝis en arogantecon." Eble ni svedoj emas elekti "al" pro nacilingva influo.
3. Ĉi tie la uzo de "tie for" ŝajnas motivita, por emfazi la efektivan distancon. Ni tamen volas atentigi, ke normale la sveda paro "här/där [borta]" esperantiĝas "ĉi tie/tie". Alivorte: "Tie for" estas pli "for" ol la ordinara "där borta".
4. La originalo diras "hemma i Sverige", sed PIV opinias evitinda tian uzon de "hejmo" kaj volas rezervi ĝin nur por paroli pri efektiva loĝejo. "Hejmlando" tamen estas aprobita sinonimo de "patrujo".
5. "Klaustrofobin klämmer samman blicken." La frazo en la originalo etas dubenca – ĉu temas pri la rigardo aŭ perspektivo aŭ eĉ la vizaĝesprimo de la soldatoj, aŭ ĉu la aŭtoro de la artikolo (la kino-eksperto Leif Furhammar) eble celas la impreson de la okazaĵoj, kiun surekrane kreas la reĝisoro de la filmo por ni, la spektantoj? Bonŝance ĉi tie per laŭvorta traduko facile eblas eviti la riskon de erara interpreto.

PAF & BW

Al ĉiuj membroj
kaj legantoj:

Bonan Kristnaskon
kaj felicĉan novan jaron!

Dezirata SEF kaj La Espero

Etimologia Vortaro de Esperanto

1 + 2 + 3 = 300 kr


Eldona Societo Esperanto
Möllevångsgatan 20 B, 214 20 Malmö, Poŝtgiro 578-5

Dags att prenumerera på esperantotidningar för 1995

Du beställer tidningarna genom att sätta in pengar på
pg 14 74 29-5, SEF specialkonto, Hörby. Ange på talongen vilka
tidningar som avses. Förfrågningar angående tidnings-
prenumerationerna kan göras hos:

Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby,
Tel: 0415-501 52.

El Popola Ĉinio, Kina	12 nr/år	210 kr
Esperanta Finlando, Finland	6 nr/år	85 kr
Eventoj, Ungern (flygpost 330 kr)	24 nr/år	280 kr
Fonto, Brasilien	12 nr/år	175 kr
Heroldo, Italien (flygpost 220 kr)	16 nr/år	190 kr
ICEM, Frankrike	4 nr/år	125 kr
Infana Klubo, Danmark	11 nr/år	65 kr
Juna Amiko, Ungern (rabatter vid flera ex.)	4 nr/år	60 kr
Kontakto, Nederländerna	6 nr/år	170 kr
Kulturaj Kajeroj, Frankrike	4 nr/år	120 kr
La Espero el Koreio, Korea	6 nr/år	135 kr
La Jaro, Nederländerna (årskalender)		65 kr
La Kancerkliniko, Frankrike	5 nr/år	185 kr
La Letero de l' Akademio, Frankrike	4 nr/år	175 kr
La Ondo, Ryssland	6 nr/år	110 kr
Literatura Foiro, Schweiz	6 nr/år	235 kr
Litova Stelo, Litauen	6 nr/år	95 kr
Monato, Belgien (flygpost 385 kr)	12 nr/år	335 kr
Norda Prismo, Finland	4 nr/år	110 kr
Norvega Esperantisto, Norge	6 nr/år	80 kr
Oomoto, Japan	1 nr/år	90 kr
Paco, Belgien	4 nr/år	105 kr
Rok' Gazet', Frankrike	4 nr i följd	160 kr
Ruslanda Esperantisto, Ryssland	12 nr/år	90 kr
Verdire, Norge	4 nr/år	95 kr



120 kr

Eldona Societo Esperanto
Möllevångsgatan 20 B, 214 20 Malmö
Poŝtgiro 578-5

Nekrologo

Nils Olsson

Nils Olsson, Höör, forpasis la 21-an de aŭgusto 1994. Li lernis Esperanton jam antaŭ 60 jaroj, kaj tiam kune kun sia frato Olle fondis la Esperantoklubon en Höör. Poste li dum multaj jaroj estis la prezidanto de la klubo. Energie kaj entuziasme li ĉiam laboris por disvastigi la internacian lingvon. Speciale dum la internaciaj Esperantosemanoj en Frostavallen li ege aktivis.

Nils Olsson estis dumviva membro de UEA kaj funkciis kiel delegito en Höör ĝis sia morto. Ofte li partoprenis en Universalaj Kongresoj ĉie en la mondo. Li havis multajn esperantajn amikojn ĉirkaŭ la tuta globo, kun kiuj li konstante korespondis.

Dum la jarkongreso de SEF en Åkersberg ĉi-jare li partoprenis en la solena malfermo kiel honora gastulo.


Paca batalanto de nia lingvo estas for, sed la memoro de la energia kaj bonhumora esperantisto Nils Olsson vivas.

Bertil Andreasson

Malmö Esperantoförening
Kronetorpsg 94
21227 Malmö

Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Krucvorta enigmo



Horizontale:

1. Etan
2. Anesteza substanco – Longperioda
3. Purigas – Nekorektaĵ
4. Havig' – Ir'
5. Skribaĵeto – Planeda
6. Paŝbruas
7. Inflam' en skeleto
8. Flavajn florojn
9. Neesperanta liter' – Ĉambra
10. Universo

Vertikale

- A. Malgaja kaj malvigla
- B. Batalkomencon – Prefikso
- C. Suprenigata – Malmola hist'
- Ĉ. Beraron
- D. Akvoguta – Korpo en ĉielo
- E. Fera oksido
- F. Maljese – Skiza scio
- G. Devas ni kelkfoje vek
- Ĝ. Deksesonon de rupio – Gem'
- H. Delfenspecon en arka maro

Ne el ĉiu ligno
oni faras violonon.

[ETT ORDSPRÅK PÅ ESPERANTO SATT MED TYPSNITTET KALIX, TECKNAT AV FRANKO LUIN 1994]



OMNIBUS TYPOGRAFI: Formgivning, fotosättning och rippning.
Produktion av allehanda trycksaker på svenska, esperanto
och andra språk.

OMNIBUS · Box 135 · 135 23 TYRESÖ · TEL. 08-742 83 36 · FAX 08-712 39 93

Solvo

de la krucvorta enigmo en La Espero
n-ro 2/94

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	T	A	J	P	A	N	T	I	N	O
2	E	T	E	R	N	O	■	R	A	R
3	K	■	L	U	S	T	R	O	■	N
4	N	A	P	E	■	■	I	S	M	A
5	O	P	I	N	I	A	S	■	O	M
6	K	R	■	K	A	L	K	A	N	O
7	R	I	B	E	■	P	O	R	■	N
8	A	O	R	T	E	■	N	A	V	■
9	T	R	U	O	J	N	■	B	E	D
10	■	E	O	N	O	■	B	O	R	I